# ATEISMO

## BULTENO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO




Virtuala kunveno de ATEO

**Novembro 2020**

N-ro 31 | www.ateisto.org

# VORTO DE LA REDAKTORO

Precize antaŭ kvar jaroj en tiu ĉi rubriko, mi skribis pri "ŝoka evento", la elektiĝo de Trump. Nun eblas ĝoji, ke li estis malvenkigita en la usona elekto, vere la plej drameca kaj plej ekscita en la pasintaj 20 jaroj. La malvenko de tiu demagogo, efektive estro de granda kulto, estas bonega okazaĵo en la alie terura jaro de la pandemio, kiu en Usono estas multe pli serioza ol ĝi devus esti pro liaj krimaj malatentado kaj misfarado.

La antaŭa numero, majo 2020, havis kiel sian ĉeftemon la pandemion, kaj nun ni spertas ties duan ondon, en multaj landoj pli fortan ol la unua printempe. Inter la du ondoj oni organizis la MondaFest' 2020 kaj ene de ĝi la Virtualan Kongreson; kadre de ambaŭ okazis ret-kunvenoj de ateistoj, en kiuj multaj el vi partoprenis. En septembro okazis publika ret-kunveno de ATEO, kies ĉeftemo estis "Kial mi fariĝis ateisto". Ĉi-numere vi trovos specialan sekcion tiuteman kun interesaj kontribuoj de membroj.

Kvankam mi mem ne parolis tiurilate, mi povas nun diri kelkajn vortojn. Mi ne memoras precize ekde kiu aĝo mi nomas min ateisto, sed verŝajne ĉirkaŭ samaĝe kiel mia esperantistiĝo, do 13-14. Verdire, simile kiel multaj "heredas" religion de siaj gepatroj, mi "heredis" la senreligiecon de miaj. Mi ja kreskis en multreligia medio en Bombajo, grandega hinda metropolo. Mia patro (jam forpasinta) estis hindua agnostikulo, mia eŭropa patrino kristana agnostikulo – ĝenerale paĉjo, veninta el hindua familio, konsideris sin hinduo, panjo ĝenerale sentas sin ligita kun kristanismo (kaj ortodoksa kaj katolika) sen esti kredanto. Miaj gepatroj ne preĝis, ne praktikis iun ajn religion; ni nur sekulare festis Kristnaskon, Holion, Divalon.

Ĉirkaŭ mi ekster mia hejmo, estis etoso plena je religioj kaj religieco; en la urbo loĝis hinduoj, islamanoj, katolikoj, parsioj kaj aliaj; abundis religiaj festoj, bildoj, objektoj, sonoj. Ĉio ĉi estis por mi simple parto de la teksaĵo de la ĉiutaga vivo; samtempe, religioj estis ia spektaklo, ia teatraĵo. Enradikiĝinte en senreligia hejmo, mi tute ne pensis pri iu ajn religio kiel afero je kio mi kredu; ĉiu ŝajnis esti kolekto de mitoj kaj ritoj. La fakto, ke ili havas malsamajn kredojn, profetojn, praktikojn, indikis, ke ili ĉiuj estas nur homaj elpensaĵoj. Kiam mi havis 11 jarojn, ni translokiĝis al Usono, al Teksaso, kaj ektrovis nin en etoso de religia fervoro, sed tute alispeca ol en Hindunio, ĉefe Protestanta, kiu estis ege malloga. En la konservativa, religiema usona Sudo, mi fariĝis konscie ateisto. Kaj tia mi restis ĉar nenio ekde tiam konvinkis min ŝanĝi mian mondrigardon.

# Someraj kunvenoj de ATEO

*Anna Lowenstein (Britio)*

Tre grava aranĝo por ATEO ĉiam estas la publika kunveno dum la UK. Tio estas ne nur okazo, kiam la membroj de ATEO povos renkontiĝi, sed ĝi ankaŭ estas momento, kiam ni prezentas nin al ekstera publiko. Tio estas nia ĉefa okazo por varbi novajn membrojn, ĉar ne estas multaj aliaj eblecoj por fari tion dum la jaro.

Kiam montriĝis, ke la UK en Montrealo devos esti nuligita ĉi-jare, ŝajnis ke ATEO bedaŭrinde ne povos aranĝi sian kutiman kunvenon. Sed bonŝance anstataŭ la UK, UEA decidis organizi ok-tagan virtualan kongreson por siaj membroj, kun multaj el la regulaj aranĝoj, inkluzive de la Movada Foiro. Ankaŭ ATEO ricevis tie sian spacon, kie ni prezentis nian agadon al interesataj kongresanoj en la formo de bildoprezento. Temoj estis: kio estas ateisto; kio estas la diferenco inter la diversaj terminoj por nekredantoj; nia revuo; la retejo; niaj celoj kaj agadoj; membreco kaj kotizo. Fakte la okazo pli similis al informkunveno ol al la fizika Movada Foiro, ĉar anstataŭ mallonge viziti kaj poste pluiri, la homoj emis resti la tutan horon por diskuti precipe la pli ĝeneralajn temojn, ekzemple kio estas ateisto, ĉu la vorto "ateisto" impresas negative, kaj similaj demandoj. Grava aspekto de Universala Kongreso, eble eĉ pli grava ol la formalaj kunvenoj, estas la momentoj kiam la homoj renkontiĝas en koridoroj kaj kafejoj por paroli pri ĉiaj temoj. La organizantoj de la Virtuala Kongreso ne forgesis provizi la partoprenantojn per tia ebleco, kreante spacojn kiuj efektive nomiĝis "Koridoro", "Kafejo", "Biblioteko" kaj simile, kie la kongresanoj rajtis renkontiĝi por babili libere. Oni donis al tiuj ĉambroj etikedojn, kun la ideo ke tiel la vizitantoj pli facile trovos aliajn kun similaj interesoj, kaj almenaŭ tri el tiuj babilejoj en diversaj tagoj kaj horoj estis asignitaj al ateistoj. Tiel do la membroj kaj nemembroj de ATEO trovis multajn eblecojn por renkontiĝi kaj amike babili pri ĉiaj temoj de komuna intereso. Tio estis unu el la plej belaj elpensaĵoj de la organizantoj de la VK – kaj cetere, krei spacojn por ateistoj estis ilia propra ideo, pri kiu la estraro de ATEO eĉ ne sciis anticipe.

Vidante la intereson, la estraro de ATEO decidis okazigi publikan kunvenon, same kiel ni normale faras dum la UK. Ĉar la celo estis prezenti ATEOn kaj ateismon al nemembroj, ni elektis sufiĉe ĝeneralan temon: "Kial mi fariĝis ateisto". Tia temo donus

al multaj homoj la eblecon rakonti pri sia persona vojaĝo al ateismo, kaj samtempe utilus por prezenti ateismon al scivolemuloj. Ni povas diri, ke la kunveno estis sukcesa. Ĝi okazis per Zoom la 6an de septembro. Ĉeestis almenaŭ 47 homoj, inkluzive de Amri Wandel, la estrarano de UEA pri Scienca kaj Faka Agado, kiu salutis nome de UEA, kaj poste parolis pri sia persona interesiĝo pri ateismo. Ĉeestis ankaŭ Ralph Dumain, la usona fondinto de ATEO en 1988, kiu mallonge rakontis (bedaŭrinde malhelpate de malbona mikrofonkonekto) pri siaj motivoj por fondi ateisman asocion tiutempe. Estis multaj personaj intervenoj, de Brian Moon (Luksemburgo), Suzanne Roy (Kanado), Franklin Montenegro (Usono), László Szilvási (Hungarujo), Luis Ladeira (Portulgalujo) kaj Orlando Raola (Usono). Krome ni laŭtlegis la sinprezentojn de Jakvo Schram (Belgujo), Bernard Behra kaj Jean-Claude Roy (Francujo) kaj Franciska Toubale (Aŭstralio). Plurajn el iliaj tekstoj vi povas legi aliloke en ĉi tiu numero.

Kvankam ni kompreneble daŭrigos la kutimon organizi kunvenojn kadre de la Universala Kongreso, estas klare, ke ni profitu de la ĵus malkovrita ebleco organizi ankaŭ virtualajn renkontiĝojn per Zoom. Per tiuj, ĉiuj membroj de ATEO havos la ŝancon partopreni, kaj ne nur tiuj, kiuj povas permesi al si vojaĝi eksterlanden kaj hazarde ĉeestas dum la UK.

**MONDAFEST'2020**
**LA MONDA FESTIVALO DE ESPERANTO**
**20 JUNIO – 20 SEPTEMBRO**

# Kial mi fariĝis ateisto



**Anna Lowenstein (Britio)**

Kial mi estas ateisto? Pro la sama kialo, kial la plejmulto da homoj estas kristanoj aŭ judoj aŭ islamanoj: ĉar miaj gepatroj estis ateistoj, kaj edukis min tiel. Mi ofte demandas min, kio estus okazinta, se miaj gepatroj estus edukintaj min kiel ortodoksan judon. Ĉu mi estus trovinta la kuraĝon iam konstati, ke mi ne kredas je Dio? Tio devus esti tre traŭma decido, eĉ timiga, sed tiun grandan salton faris miaj gepatroj, ne mi.

Mi apenaŭ povas imagi, ke kiel plenkreskulo mi ne estus iam demandinta min, ĉu vere mi kredas je tiu kvazaŭmagia forto, kiu kreis kaj regas la mondon. Nuntempe precipe en Britujo oni estas ĉirkaŭata de skeptikismo, eĉ en popularaj televidaj elsendoj, do estus malfacile ne aŭdi la malan vidpunkton, krom se oni intence fermus al tio sian menson. Se oni decidus fari la salton, oni tute ne sentus sin sola, kaj facile trovus aliajn homojn kun la sama opinio. Tial plaĉas al mi pensi, ke kun vasta morala subteno en la ĉirkaŭa socio, mi estus alveninta al la evidenta konkludo. Estas vere malfacile kompreni, kiel en la moderna mondo la homoj ankoraŭ sukcesas kredi je supernatura forto.

Por judoj, la malfacileco ne estus nur la neplua kredo je Dio, sed forlaso de la komunumo. Eble tiu paŝo estis pli facila por miaj gepatroj, ĉar ili ambaŭ restis solaj relative frue. Mia patro venis al Britujo kiel rifuĝinto, kiam li estis 15-jara, dum mia patrino 18-jara lasis siajn gepatrojn kaj venis el norda Anglujo por loĝi en Londono. Ŝi iam diris, ke la decida momento por ŝi okazis, kiam en Jom Kipur (la plej sankta tago de la jaro, kiam eĉ ne aparte ortodoksaj judoj fastas dum 24 horoj), ŝi eniris kafejon kaj mendis sandviĉon. Kial ŝi devis sidi en kafejo por manĝi? Ĉu ŝi tiam ankoraŭ loĝis ĉe siaj gepatroj? Laŭ mia memoro, ŝi menciis tion nur unu fojon, kaj bedaŭrinde mi ne demandis ŝin pri la cirkonstancoj, nek pri la rezonado, kiuj kondukis ŝin al tiu mondoskua ago. Nun estas tro malfrue.

## Jean-Claude Roy (Francio)

Kiam mi estis 23-jara, mi fariĝis kristano pro konatiĝo kun bela anglino, kiu loĝis en Marazion, havenurbeto apud Penzance en Kornvalo, kie situas la Monto Sankta Mikaelo (malpli granda ol tiu en Francio). Mi konatiĝis kun ŝi kiam mi estis en Calais.

Do mi fervore preĝis ktp, sed mi poste konstatis, ke la klerikoj de la eklezio estas hipokritaj kaj mi eĉ renkontis unu el ili en Anglio, kiu provis seksperforti min!!! Kaj fine mi venis al la konkludo, ke ĉio ĉi estas sensencaĵo kaj ke Dio certe ne ekzistas. Kaj mi decidis ne plu kredi! Mi ne bedaŭras mian elekton. Persone mi pensas, ke post la morto estas nenio. Fino de vivo! Laŭ mi, ne ekzistas animo aŭ aliaj mistikaj aferoj.




## Song Jeong-ok (Germanio)

Mi partoprenis virtualan kunvenon de ateistoj, kies ĉefa demando estis "Kial vi fariĝis ateisto?" Diversaj jam konataj membroj de la asocio rakontis pri siaj respondoj al la demando. Ĉies kialoj estis iomete malsamaj de la aliaj, sed ĉiuj atingis la saman rezulton, ke Dio ne ekzistas. Jes, ankaŭ mi opinias, ke Dio ne ekzistas.

Sed en mia penso restas iometete neklara sento, ke ĉu vere Dio ne ekzistas? Mi certas, ke la dioj de ĝisnunaj religioj ne ekzistas, ĉar iliaj dioj estas iasence pli malgrandaj eĉ ol mi. Ekzemple, ili ĵaluzas kontraŭ aliaj dioj, diskriminacias rasojn, punas terure, venĝas ĝisoste, ordonas senfine ktp.

Tio signifas, ke la diojn kreis tiamaj primitivaj homoj, kiuj ne multe sciis pri naturaj fenomenoj kaj pri la homo. Pro evoluo de scienco kaj longjaraj akumulitaj homaj spertoj, la nunaj homoj estas multe pli evoluintaj ol la primitivaj. Laŭ mi, se ekzistus Dio, tiu devus esti senfine pli granda ol la homo, la naturo kaj eĉ la universo.

Tamen pro la religioj, homoj atingis tre altan nivelon de kulturo, arto, literaturo, arkitekturo ktp. Preskaŭ en ĉiu flanko de la homa vivo, ĝi ludis grandegan rolon. Kompreneble, pro la religioj, nekredeblajn malbonaĵojn, teruron kaj mizeron spertis la homoj. Plej ofte religioj ekspluatis malfortajn kaj malriĉajn homojn kaj ankaŭ kaŭzis terurajn militojn.

Aliflanke, pro religia pensado, ni homoj ankaŭ riĉiĝis. En Koreio bonŝance mi konatiĝis kun kelkaj grandaj homoj, kies verkoj, pensoj kaj vivmanieroj influis min resti sur la ĝusta vivovojo almenaŭ ĝis nun. Kaj estas rimarkinde, ke ili estas kaj estis religiuloj kiel kristanoj kaj budhanoj. Neklarigeblan forton kaj ŝaĝon ili posedis pro la kredo al la religioj. Tio signifas, ke preni la esencon de religioj estas tre helpe kaj saĝe por atingi altnivele valoran vivon.

Kaj fine, mia respondo al la demando: mi ne fariĝis ateisto kaj ankaŭ mi ne nepre diras, ke mi estas ateisto. Ĉar mi ŝatas esti pli libera ol ateisto, kiu neas la ekziston de dio kaj kontraŭas religion. Kontraŭi ion bezonas enorman energion, kiu estas vane uzata laŭ mi.




## Franciska Toubale (Aŭstralio)

Kiel preskaŭ ĉiuj infanoj, kiuj naskiĝis en Bretonujo, nord-okcidenta provinco de Francujo, mi estis edukita laŭ la katolika kredo. Miaj gepatroj ne "praktikis". Laŭ la loka esprimo, tio signifas, ke ili ignoris la devigon ĉeesti meson ĉiudimanĉe, preĝi ktp. Ilia aparteno al la paroĥanaro montriĝis pere de ni, la infanoj. Ili sendis nin al la kateĥismolernejo. Por ŝpari monon, ili decidis, ke mia duonfratino kaj mi samtempe trairos la ceremonion en kiu oni refaras la promeson faritan nianome de niaj baptogepatroj, ke ni katolike vivos. Pro tiu malfruo, mi estis jam en la dua klaso de la meza lernejo, kiam mi solene promesis submetiĝi al la ordonoj de tiu eklezio.

Mi jam konis la mitologion de diversaj etnoj, aparte de la romianoj kaj la grekoj. Mi jam studetis aliajn religiojn kiel islamo kaj budhismo. Do pli kaj pli la kreado de la mondo en kelkaj tagoj dank'al Dio, la forpelo de Adamo kaj Eva el la paradizo fariĝis por mi simple alia mitologio. Plie ĝenis min la koncepto de la origina peko, la ideo ke homo nepre estu humila kaj ne povas fari iun ajn bonaĵon krom pro la helpo de Dio. Mi ne volis vivi en konstanta timo, ke mi ricevos punon. Mi volis esti honesta, kompatema, solidara, ne por eviti punon, sed ĉar tiel komunumo povas vivi pli ĝoje kaj harmonie. Do mi malŝarĝis miajn ŝultrojn de tiu peza handikapo kaj sentis min liberigita.

## Bernard Behra (Francio)

Dum pli ol kvindeko da jaroj mi estis pli aŭ malpli laŭ la epoko sufiĉe bona kredanto je Dio. Mi tamen lasis ĉiam ian lokon por dubo kaj por la alia hipotezo, do tiu pri la ne-ekzisto de Dio. Nun, kiel ateisto, mi konservas respekton al ĉiuj kredantoj je Dio kaj mi restas interesata pri ĉio, kio koncernas la religian fenomenon, kiu ne estas disigebla de la homa aventuro.

Mi neniam vere kredis je la reviviĝo de la mortintoj, je la paradizo, je la postvivo de la animo, je la virgulina koncipiĝo de Jesuo, aŭ pli simple je lia historieco, je la mirakloj.

Mi legis entute almenaŭ dekfoje la Biblion. Multaj paĝoj de la malnova testamento vere ŝokis min. Mi ĉiam pensis pli-malpli, ke la Biblio ne estas la parolo de Dio sed diroj kaj rakontoj imagitaj kaj uzitaj de la homoj laŭ ilia kredo sed ankaŭ laŭ iliaj timoj, superstiĉoj, deziroj kaj ĉefe (eĉ bedaŭrinde ne malofte krimaj kaj perfortaj) interesoj por stultigi, submeti kaj sklavigi aliajn homojn.

Eĉ kiam mi ankoraŭ ne nomis min ateisto, mi ĉiam provis doni laikan aŭ ne-kredantan aŭ filozofian signifon aŭ komprenon al ĉiu kredo, rito aŭ rakonto de la religio. Ekzemple: pri preĝo, mi sufiĉe frue pensis, ke preĝi al Dio estas fakte paroli al si mem, al la plej bona parto de si mem, sed paroli kun amo kaj esprimi la dezirojn de justeco, paco, bono, amo kaj feliĉo por si mem kaj por ĉiuj homoj, dezirante trovi en si mem kompatojn, konsolojn, fortojn kaj rimedojn por atingi tiujn bonajn celojn.

Mia nuna ateismo estas ĉefe intereso pri la ateisma fenomeno tra la historio kaj ankaŭ kiel oni estas aŭ povas esti ateisto en la nuna epoko. Sed kiel kredanto aŭ nun kiel ateisto, mi unue nomis kaj nomas min humanisto; tio signifas provi travivi kaj esti respondeca pri kelkaj fundamentaj ideoj kaj valoroj:

- Respekto al la vivo (ĉiuj vivaĵoj);
- Libereco pensi (interalie: libereco esplori kaj informiĝi, instruiĝi kaj studi, esprimiĝi aŭ silenti);
- Interkompreniĝo inter ĉiuj homoj;
- Respekto de la homaj rajtoj.



## Aleksandro Ĥoroŝilov (Rusio)

Malfacile eĉ rememori kiam mi iĝis ateisto. Nu, kiam mi estis lernejano, ni loĝis ankoraŭ en Sovetunio. Kaj la lernejo kaŭzis, ke mi iĝis ateisto. Pri la Inkvizicio mi memorfiksis por ĉiam. Mi interesiĝis tiam pri astronomio, fiziko kaj tekniko. Kaj iel tute ne estis loko por religio en mia kapo.

Poste, kiam jam regis Jelcin, mi indigne rigardis, kiel li oferis oran ingoton el ŝtata trezorejo por kupolo de tiam restaŭrata preĝejo en Moskvo.

Vere estis, ke en la 90-aj jaroj mia patrino kaj mi turnis nin al moskva kuracisto, kiu kuracis per t.n. diecaj agordoj. Laŭ legendo tiu kuracisto mem resaniĝis post kiam oficiala medicino ne helpis al li. La diecaj agordoj estis tiaj paroloj konvinke eldiritaj kaj registritaj je magnetofonaj kasedoj. Tie li parolis, ke ĉiam eblas turni sin al supera forto, kosmo, dio, dia patrino kaj ĝi helpos al vi. Kiel mi komprenis, li diagnozis laŭ okulo. Mi sidis antaŭ li, kaj mi devis rigardi al lia nazradiko kaj li rigardis tra lupeo mian okulon. Sed, probable, mi ne estis ema al tia metodo kaj al mi diecaj agordoj ne helpis.

Poste mia patro forpasis kaj nun al mi estis malagrable, ke en la ĉambro de patrino troviĝis ikonoj kaj je difinita tago ŝi vizitis preĝejon por preni t.n. sanktan akvon.

Plue unu kazon mi rakontos. Foje mi staris ĉe busstacidomo kaj rigardis al aviadilo, kiu faris aerobatikon (mi tiam mem provis iĝi piloto en flugoklubo) kaj ne rimarkis, ke apude staris popo kun kesteto por oferoj. Kaj la popo demandis, ĉu mi volas oferi por preĝejo. Mi rifuzis, kaj li diris ke mi foriru, ĉar mi baras lin. Nu, mi foriris sed penso en mia kapo trakuris: ilia tempo nun estas ... Kaj estis en mi domaĝa sento, kiu stampiĝis en mia memo.

Poste, kiam jam mi havis komputilon, mi trovis filmon ĉe Jutubo, en kiu klare estis montrite, ke ortodoksismo kaj faŝismo kunfandiĝis en Rusio. La filmo nomiĝas *Pravoslavije v zakone* (Ortodoksismo laŭ leĝo). Tie temas pri Rusio de la 21-a jarcento. Poste, laŭ mi, la filmo estis malpermesita, sed mi konservis ĝin.

Mi tralegis la librojn *Kiel la homo ekis pensi* kaj *La dek du pruvoj pri neekzisto de Dio* kaj la verkojn de Voltero, kvankam li ne estis ateisto, sed skribis pri religio.

De multaj jaroj okazas nenio, kio igus min ĉesi esti ateisto.



## Orlando Raola (Usono)

Mi havas eble interesan rakonton pri mia ateismo, kiu devas inkluzivi mian fervore katolikan avinon (patrino de patrino), kiu same fervore katolike edukis sian filinon (mia patrino), kiu enamiĝis al mokema ateisto (mia patro) kaj estis forbarita edziniĝi al li dum sep jaroj. Dum li vizitis senespere la fianĉinon, mia avino laŭte aŭdigis al ambaŭ radioprogramon, en kiu katolika pastro sufiĉe elokventan kaj socie progreseman ĉiutage liveris longan paroladon, kaj mia patro iom varmiĝis al tiu pastro kaj esprimis iel hazarde, "bone, kun pastro tia eble mi akceptos edziĝi en preĝejo". La avino kuris al la pastro kaj klarigis al li la situacion kaj tiu pastro diris al ŝi: Mi donacos al la gefianĉoj la plej luksan geedziĝan ceremonion (ili ĉiuj estis sufiĉe malriĉaj, tiom ke ili neniam estus eĉ revintaj pri geedziĝo en "Misa de Velaciones", t.e. vespermeso). Li elsputis la hostion post la ceremonio, kaj la geedziĝo bone funkciis. Kiam ŝi kun patrino iris al preĝejo, li kun amikoj iris al trinkejo... ĝis la Revolucio okazis.

Ambaŭ gepatroj estis forte enplektitaj en la movado gvidata de Castro, kaj malgraŭ tio, ke komence la rilatoj kun la katolikoj estis, mi dirus, bonaj (Fidel estis mem edukita de jezuitoj), la Katolika Eklezio posedis multe de la plej bonaj teroj en la lando kaj la registaro deprenis ĝiajn posedaĵojn. Fine de la mielmonato kun katolikoj, aferoj fariĝis sufiĉe akraj, kaj mia



patrino iom post iom retiriĝis el la Eklezio kaj plifirmiĝis en ŝia komunisma kredo kaj en la ateisma filozofio de mia patro. Notindas, ke en tiu tempo en Kubo aparteno al la Komunisma Partio (unusola en la lando) estis barita al iu ajn, kiu konfesis ajnan religian sintenon. Do, kaj panjo kaj paĉjo partianiĝis.

Tamen la avino ĉiam restis ĝis sia morto en la hejmo, kun ĉiuj katolikaj sanktuloj kaj bildoj kaj kandeloj, kaj ni ĉiam respektis kaj amis ŝin kaj respektis ŝian di-kredadon. Kiam ŝi ne plu povis marŝi sola, ni venigis ŝin al preĝejo kaj ree hejmen kaj kiam ŝi ne plu povis marŝi, la pastro venis al la hejmo, amikiĝis kun ĉiuj en la hejmo kaj la vivo iris tute pace kaj trankvile. Alia kuriozaĵo: donace por la fama geedziĝo priskribita supre, la avino donacis al mia patrino bildon de Jesuo kun la flamanta koro "La Sankta Koro". Ĝi ĉiam pendis sur la muro de la ĉefa salono de la hejmo. Sed subite aperis sur la kontraŭa muro, bildo de Vladimir Iljiĉ Lenin, kiu rigardis agle al la suferanta Jesuo. Ĉiuj kiuj vizitis nin rigardis unu muron, kaj la alian, kaj denove la unuan, kaj ... En tiu etoso mi kreskis kaj edukiĝis.

Kompreneble, kiam mi estis eta infano, mi vizitis multajn preĝejojn, estis ravita de la oro kaj la incenso kaj diris, ke mi volas esti pastro kiam mi estos pli aĝa... Sed bonŝance tio ne daŭris longe. Jam dum miaj lernejaj jaroj, ĉiam pli kaj pli la edukado pri dialektika kaj historia materiismo enradikiĝis. La mondaj socioj kiuj baziĝis sur tio (almenaŭ teorie – en la praktiko ĉio estis multe pli malklara) jam forpasis, sed mia filozofio tiurilate ĉiam pli kaj pli fortikiĝas. Mi loĝas jam de 26 jaroj en lando, kie ĉiutage ni devas lukti por ke ĝi ne fariĝu teokratio, kie la nivelo de religieco rivalas al tiu de la plej konservemaj islamaj landoj, kaj kie nur manpleno el la 541 elektitaj parlamentanoj je la federacia nivelo deklaras sin ne aligitaj al iu aŭ alia religio. Eĉ la vorto "ateisto" ne estas uzata en la ĉiutaga parolado; ĝi estas tro negativa. Do ĉi tie, mi estas membro de American Humanist Association, kvankam mi estas vera kaj profunda ateisto. Kaj notu, ke mi eĉ ne vere ŝatas la ideon de ateismo, ĉar eĉ aludo al kredo aŭ ne kredo je dio (aŭ eĉ pli ĝene, tiu vorto kun majusklo) jam donas agnoskon al io, kio ne ekzistas. Ne temas pri tio, ke mi ne kredas je ĝi; tio, kion mi kredas estas, ke ne ekzistas dio aŭ Dio aŭ dioj en ajna formo aŭ koloro.

"Se ni kredas absurdaĵojn, ni faros teruraĵojn."



*Voltaire (1694-1778)*

**Luís Ladeira**
**(Portugalio)**

Mi iĝis ateisto pro filozofiaj kialoj.

Unue mi konsciis, ke la homo ne bezonas dion por esti morala.

Poste mi komprenis, ke apelacii al racie nekomprenebla estulo, kiel kreinto de la universo, por klarigi tion, kion ni ne komprenas pri ĝi, estas mensekzerco tute neracia, por ne diri stulta.

Revenante al la morala aspekto, mi devas aldoni, ke iom post iom klariĝis en mia kapo tio, ke la bono kaj la malbono koncernas nur homojn. Do, io ajn estas bona aŭ malbona se ĝi konvenas aŭ malkonvenas al homoj, t.e. pro individuaj kaj sociaj kialoj. Nenia supera estulo estas bezonata por starigi la bonon kaj la malbonon. Do, rilate al la moralo, dio iĝis, por mi elĵetebla.

Ankaŭ pri bezono de demiurgo, t.e. supera kreinto de la enigma universo, mi same konkludis pri ĝia elĵeteblo. Kial? Ĉar apelacii al tia estulo ekvivalentas al apelaciado al nenio. Se oni postulas estulon absolutan, sentempan kaj infinitan, kiam oni tute ne komprenas kion tiaj atribuoj signifas, la rezulto estas iluzio pri la solvo de la problemo, sed ne la solvo mem. Mi preferas resti en mia nescio ol apogi min sur iluzio, kiu finfine signifas ne esti konscia pri sia propra nesciado. Do, demiurga dio nepre estas elĵetenda!

Laste, kian dion mi elĵetis? Mi elĵetis kaj daŭre forĵetas tiun, kiu al mi estas prezentata, kiel nura spirito, kiu transcendas la universon kaj ĝin regas laŭ arbitra volo. Temas pri la dio de la religio, kreaĵo de la homa imago, deziro kaj timo. Dum tro da tempo mi honoris tiun fantomon. Ne plu!

Sed mi ankaŭ devas aldoni, ke mi ne tute forĵetas la de mi nekompreneblajn konceptojn *absoluto, infinito* (nefinita) kaj *eterno* (netempa). Cetere, mi ankaŭ pensas, ke la *racio* ne estas/estos la lasta pensmaniero de la homaro, ĉar same, kiel la homa penso evoluis el mita pensmaniero al racia pensmaniero, eblas al ĝi evolui al alia pensmaniero ĝuste tiam, kiam la racia pensado montriĝos limigita. Kaj ĝi (la racio) montras siajn limojn ĝuste tiam, kiam ĝi atingas la praeksplodon, kiu kreis la fizikan universon kune kun la spaco kaj la tempo (same, kiam ĝi atingas la *kvantuman mondon*). La racia pensmaniero bezonas spacon kaj tempon por funkcii – la nuntempa raciulo ne kapablas kompreni ion ajn ekster la koordinatoj spaco kaj tempo. Per racio atingi la praeksplodon(kaj same atingi la *kvantuman mondon*) indikas ne nur alveni al la komenco de la fizika spactempa universo, sed ankaŭ al la limo de la racio. Kio restas, do?

Ĉi tie mi alvokas Spinozon, la filozofo, al kiu la tuta realo estas **substanco unika** – finita/infinita, tempa/eterna, relativa/absoluta. Substanco al kiu apartenas la *fizika universo* sen ke ĉi tiu elĉerpu la realon. Substanco, kiu forĵetas dualismon inter materio kaj spirito, kaj supozas la fizikan universon kiel nuran esprimon de pli kompleksa realo. Tie kuŝas mia nesciado.

# ATEO havas novan prezidanton!

Malkovrinte la eblecon organizi virtualajn kunvenojn (vidu p.3), ni konstatis, ke eblas organizi ankaŭ asembleon por ĉiuj niaj membroj. Nia virtuala asembleo okazis la 31an de oktobro je 12h00 UTC. Trovi taŭgan horon ĉiam estas malfacila afero por tutmonda renkontiĝo, kaj kvankam la horo estis tute aŭ relative komforta por la plejmulto el niaj membroj, ĝi estis maloportune frua por tiuj en la okcidenta bordo de Usono. Aliflanke nia sola aŭstralia membro ĝuis maloftan ŝancon partopreni. Ĉeestis 25 homoj – fakte, nur iom pli ol triono de niaj membroj.

La unua punkto de la tagordo estis la anonco de la rezultoj de balotado por nova estraro, inkluzive plej grave de la nova prezidanto. La posteno de prezidanto de ATEO vakis dum kelkaj jaroj. Ĝis nun la elektoj de ATEO estis neformalaj aferoj okazantaj dum la privata kunsido ĉe la



*Giridhar Rao, nova prezidanto de ATEO*

UK inter la homoj, kiuj hazarde ĉeestis. Ankaŭ la elektitoj kutime troviĝis inter la hazardaj ĉeestantoj. Ĉi-jare la unuan fojon ni organizis retan voĉdonadon inter ĉiuj membroj. Ni ĝojas informi, ke 53 el niaj 71 membroj voĉdonis, kaj tiel ni povis elekti novan prezidanton, Giridhar Rao el Barato.

Krom tio ni povis konfirmi la plulaboradon de la restantaj estraranoj: Dominique Simeone (Francujo) kiel vicprezidanto, Anna Lowenstein (Britujo) kiel sekretario, Dieter Rooke (Svislando) kiel kasisto, kaj Nyegosh Dube (Pollando) kiel redaktoro. Nia antaŭa estrarano kaj grafikisto Jakvo Schram retiriĝis. Ni dankas lin pro lia laboro. Anstataŭas lin kiel grafikisto Lautaro Croce el Argentino, kiun ni varme bonvenigas. Ni dankas ankaŭ nian membron Anthony Bodineau, kiu aranĝis la virtualan elekton.

Sekve, ni diskutis la financan situacion de la asocio, kiu estas sufiĉe forta, tiel ke almenaŭ ĉi-jare ne necesos altigi la kotizon. Estis demando, por kio oni pagas la kotizon: ĉu por subteni la asocion, ĉu por aboni la bultenon. Pri tio ni devos pludiskuti en posta kunveno. Krome, ni konsideris la eblon havi nur retan bultenon, sed pluraj homoj esprimis deziron pluricevi ĝin papere. Alia temo traktita estis la ĝisdatigo de la retejo kaj kreado de forumo por la membroj; por ambaŭ aferoj la problemo estas trovi prizorganton.

Ni povos plu okazigi virtualan asembleon ĉiujare, kaj la dato fine de oktobro ŝajnas oportuna. Ni ankaŭ deziras daŭrigi la publikajn kunvenojn kelkfoje jare.

# Pri la universo, dio kaj religioj

*Jiri Proskovec*



Lastatempe oni ofte aŭdas pri religioj kaj ilia rolo en la socio. Oni aŭdas, kiajn terurajn krimojn homoj kapablas fari je la nomo de religio, kiel aŭtoritataj ŝtatestroj funkciigas ŝtatojn laŭ religiaj principoj aŭ kiel eĉ en demokratiaj ŝtatoj religiaj premgrupoj igas, ke ŝtata leĝaro kongruu kun religia doktrino. Tio instigis min skribi ĉi tiun eseon.

## Observado kaj perceptado

Tuj kiam homoj akiris la kapablon de racia pensado, ili rigardis la naturon kaj penis ekspliki siajn observojn. Malantaŭ naturaj fenomenoj, kiel vetero, tertremo, malsano aŭ morto, ili vidis agadon de dio(j). Tiel estiĝis la unuaj religioj, kiuj dum jarmiloj plu evoluadis, kaj ĉiu homa kulturo evoluigis sian propran religion.

Sed antaŭ relative mallonga tempo radikale ŝanĝiĝis la percepto de nia mondo. Ekde Koperniko (1473-1543) oni scias, ke la tero ne estas la centro de la universo kaj nur dum la lastaj jardekoj astronomiaj scienco kaj tekniko sufiĉe progresis por povi scii, ke nia planedo okupas tute sensignifan pozicion en neimageble granda universo.

## La universo

Mi certas, ke apenaŭ iu povas ĝuste imagi la grandecon de la universo. (Fakte mi mem estis tre surprizita leginte pri tio en astronomia publikaĵo). Imagu, ke oni malgrandigus la universon je la grandeco de nia teroglobo. Kiom granda estus tiam la suno? La suno posedus grandecon de iom granda mikrobo, kaj la tero tiun de viruso. Per aliaj vortoj, ili ne estus perokule videblaj.

Alia interesa fakto estas la neimagebla nombro da steloj. Nur en nia galaksio estas 300 miliardoj da steloj. En la universo troviĝas miliardoj da galaksioj (kiom, tion la scienco ankoraŭ ne kapablas kalkuli). Tio signifas, ke ekzistas miliardoj da miliardoj da steloj. Eĉ se vivo (kaj precipe inteligenta vivo) estas tre rara fenomeno, ĉar nur tre malmultaj steloj havas taŭgan

vivdaŭron por ebligi sur siaj planedoj ĝian estiĝon, ni tamen, konsiderante la preskaŭ senliman nombron da steloj, povas esti certaj, ke ekzistas vivo (kaj certe ankaŭ inteligenta vivo) sur multegaj planedoj.

## Kion faras dio?

Estiĝas la demando, kia estas la rolo de dio en la universo. Eĉ se multaj homoj probable kredas male, krei nur la homojn ne povis esti dia intenco. Se dio ekzistas, ĝi kreis (kaj ankoraŭ kreos) multegajn alispecajn inteligentajn estaĵojn. Pli precize: ĝi programis ilian (hazardan) estiĝon, ĉar kiel ni intertempe scias, viva materio evoluas el neviva dum ege longa procezo sur (hazarde) taŭgaj planedoj.

Alia demando estas, ĉu dio iel influas la vivon sur nia planedo aŭ evoluon en la universo entute. Laŭ mia opinio certe ne, ĉar mi ne povas pensi pri unu sola fenomeno, kiun oni ne povus nature kaj racie klarigi. La rolo de dio do limiĝas al la kreo de la universo kaj (laŭ la kredo de religiuloj) al la prizorgo de ni post nia morto.

## Ĉu religioj enhavas dian volon?

Ekzistas multaj religioj kaj homoj kredas, ke ĝuste ilia estas la vera. Sed kial? Aŭ ĉu ĉiuj religioj enhavas dian volon nur en diversaj aspektoj? Por respondi tiujndemandojn ni rigardu la aferon el la vidpunkto de dio mem. Dio, kiu kreis la ege kompleksan kaj neimageble grandan kaj preskaŭ nekompreneblan universon, devas esti estaĵo ege supera, inteligenta kaj kapabla. Ĉu povas esti, ke tia dio ne kapablis revelacii al homoj alimaniere ol nur komuniki sian volon pere de kelkaj homaj profetoj, kiuj siatempe povis komuniki la mesaĝon (kial diversan?) nur al tre limigita aro da homoj kaj kiu ofte nur per perforto povis disvastiĝi?

Pensu nur pri la kristanigo de Ameriko, pri la disvastiĝo de islamo aŭ pri fruaj kristanoj, kiuj laŭ esploroj de sendependaj historiistoj ne multe diferencis de la nunaj fanatikuloj de la t.n. Islama Ŝtato (oni sciu nur, ke la eklezio poste multajn juste ekzekutitajn perfortulojn deklaris martiroj kaj sanktigis ilin). Ĉu povas esti, ke dio volis aŭ toleris tion? Kompreneble ne, kaj la sola ĝusta konkludo povas esti nur, ke dio neniel revelaciis sian ekziston kaj volon, kaj religioj estas homa elpensaĵo.

## Ĉu dio ekzistas?

Se estas tiel, ke la rolo de dio en la universo limiĝas nur al ĝia kreo, tiam estiĝas la demando, ĉu oni entute bezonas dion por ekspliki la universon. La universo estiĝis antaŭ 14 miliardoj da jaroj el stato, kiun astrofizikistoj nomas “singulareco”. Kial ĝi estiĝis, aŭ kio estigis ĝin, la scienco ankoraŭ ne kapablas kontentige ekspliki. Sed ĉu estas saĝe kaj logike supozi, ke tio estis ago de dio? Se tiel estus, tiam dio devus esti eĉ multe pli kompleksa kaj nekomprenebla ol la ekzistantaj materio kaj energio. Kaj tia dio ne bezonas esti kreita? Kial do la universo? Tio miaopinie malhavas logikon. Pri la estiĝo de la universo astrofizikistoj havas diversajn teoriojn, sed teorio pri inteligenta dio ne estas inter ili.

## Kial homoj kredas?

Komparante diversajn landojn, kiel ekzemple Ganaon kun Svedio aŭ Ĉeĥion kun Pollando, ni konstatas okulfrapajn diferencojn en la religieco de homoj. Evidente ekonomia evoluo aŭ/ kaj tradicioj ludas gravajn rolojn. Sed en ĉiu socio ni trovas homojn profunde religiajn kaj aliajn malpli tiajn, same kiel ni trovas konservativajn homojn kaj liberalajn. Sociologoj eksplikas tion per diversa homa emocieco. Homoj, kiuj havas timojn, estas ofte tre religiaj (kaj konservativaj). Observi religiajn doktrinojn estas por ili tre grave, ĉar ili kredas, ke tio estas la volo de dio. Aliflanke homoj liberalaj uzas religion ĉefe por pravigi sian etikon, kaj el la religia doktrinaro ili elpikas nur "frandaĵojn".

Miaopinie homaj timoj respondecas pri la nuntempa kresko de religia fundamentismo. Ni vivas en mondo ekonomie, socie kaj kulture rapide ŝanĝiĝanta. Multaj ne kapablas kunpaŝi kaj serĉas konsolon en religioj. Se religio restas paca afero, estas akcepteble, ke homoj tion faru. Bedaŭrinde multaj religiuloj kaj religiaj organizaĵoj, kiuj en demokratiaj ŝtatoj ĝuas plenan liberecon por praktiki religion, misuzas sian influon por ŝanĝi la leĝojn laŭ sia senco kaj devigas tiel ankaŭ nereligiulojn vivi laŭ religiaj doktrinoj. Tio estas tre malhonesta, neniel pravigebla kaj nepre kondamnenda konduto.

*Tiu ĉi artikolo unue aperis en la revuo Monato (numero de junio 2020). Ĝi estis verkita de Jiri Proskovec, korespondanto de Monato en Germanio. Ni dankas la redakcion de Monato kaj la aŭtoron pro ilia afabla permeso republikigi la artikolon en Ateismo.*



# La sankta Harry Potter

*Meir Shalev, tradukita de Gabi Zeevi*




Mi legis, ke en la ekstrem-ortodoksa gazeto *Fidela Ankro* aperis kruela kritiko pri la libro-serio *Harry Potter*. La *Fidela Ankro* priskribas la aventurojn de Harry Potter, kiel "fantazian infanfabelon deŝiritan de la realeco", kaj asertas, ke la eksterordinara populareco de la serio atestas la "senfundan vakecon de la okcidenta socio, kaj la profundecon de la abismo, al kiu ĝi alproksimiĝas". "Plenkreskuloj, kiuj kondutas kiel stultetaj infanoj..." primokas la *Fidela Ankro*, "...kaptiĝas per fantaziaj fabeloj". Kaj vere, kiu povus scii pli bone, ol la legantoj de la *Fidela Ankro*, kiel granda estas la efiko de la fantaziaj fabeloj!


Tio okazis eĉ al mi! En la tempo, kiam mi estis ankoraŭ infano – nature, tia stulteta – ankaŭ mi estis kaptita de kelkaj tiaj fabeloj. Precipe bone mi memoras unu fabelon, kiun mia patro kutimis laŭtlegi al mi antaŭ la ekdormo, kaj se mi ne eraras, kiun ni lernis ankaŭ en la lernejo. Nun mi ne plu memoras, ĉu ĝia nomo estis "Eliro" aŭ "Nia gvidanto, Moseo, kaj la sorĉa bastono", sed mi tre ŝatis la enhavon. Temas en ĝi pri iu infano, kiu kreskas en la korto de la egipta reĝo, kaj kreskinte, ricevas magian bastonon, per kiu li ŝprucigas akvon el roko, plenigas la Nilon per ranoj, kaj eĉ dividas la akvon de la Ruĝa Maro. La lastan parton, la dividon de la akvo en du partojn mi plej ŝatis, ĉar, estante infano, mi ankoraŭ ne sciis, ke tio estas fabelo deŝirita de la realeco – mi kredis, ke tio vere okazis.

Sed feliĉe mi plenkreskis kaj, simile al la legantoj de la *Fidela Ankro*, mi komprenis, ke ĉio ĉi estas fantazia fabelo deŝirita de la realeco, kiu atestas

la senfundan vakecon de la socio, kaj taŭgas nur por stultetaj infanoj. Sed je plej granda bedaŭro, la plimulto de la plenkreskuloj ankoraŭ ne estas tiel matura kaj respondeca kiel mi kaj la redaktoroj de la *Fidela Ankro*. La plimulto de la plenkreskuloj plu kondutas kiel stultetaj infanoj, kaj sekvas blinde la imagajn fabelojn deŝiritajn de la realeco; eĉ, laŭ la rakonto "Nia gvidanto, Moseo, kaj la sorĉa bastono", ili festas la ceremonion per iu soleno nomita Pasko.

La fabelo "Nia gvidanto, Moseo, kaj la sorĉa bastono" ne estas la sola. Ĉi tie ni parolas pri tuta fabel-serio, kiu estis verkita longe antaŭ la serio *Harry Potter*, kaj la ciferoj en ĝia vendo-statistiko montras eĉ pli grandan sukceson. Mi memoras ankoraŭ la titolon "Nia prapatro Jakobo, kaj la ĉiela ŝtuparo" (Jakobo estas juna knabo, kiu fuĝas de sia kruela frato kaj babilas kun Dio), kaj la fabelon "Balamo kaj la parolanta azeno" (La azeno de Balamo, la maljuna kaj malica sorĉisto vidas anĝelon sur la vojo, dumtempe la mastro vipbatas lin senĉese), poste estas "Isaako Potter kaj lia patro kun la tranĉilo" (ne rekomendata por infanoj). Sed plej bone plaĉis al mi la serio "Elija": "Elija Potter kaj la fajra ĉaro" (vera historio, kiu radikiĝas en la realeco, kaj rakontas pri la profeto Elija, kiu supreniras al la ĉielo sur ĉaro tirata per fajraj ĉevaloj), kaj "Elija Potter kaj la sorĉa robo" (sukcesa dokument-rakonto pri tio, ke Elija faldas sian robon, frapas per ĝi la riveron Jordano, kaj tiam ties akvo dividiĝas en du partojn), kaj "Elija Potter kaj la falsaj profetoj de la reĝino Jezabelo" (fakt-romano kun pruvoj, en kiu Elija kaj la profetoj de Baal renkontiĝas sur la monto Karmel, Elija prenas fajron el la ĉielo kaj poste ankaŭ pluvnubojn).


Kelkfoje mi trovis ankaŭ tradukitajn popularajn rakontojn kiel "Neĝulino kaj la sep nanoj" kaj "Orbuklulino kaj la tri ursetoj" – sed eĉ estanta malgranda infano, mi komprenis, ke ĉi tie temas pri fantaziaj infanfabeloj deŝiritaj de la realeco, kies eksterordinara populareco atestas la senfundan vakecon de la okcidenta socio. Pro tio mi poste interesiĝis nur pri veraj historioj, kiuj ligiĝas al la realeco, kaj atestas tiujn altajn spiritajn pintojn sur kiuj staras la juda kulturo. Ekzemple "Aarono Potter kaj la ora bovido", "Bar Joĥai Potter kaj la karobarbo", "La sankta Ha-Ari Potter el Safed", "Abu-Ĥacira Potter kaj la magia tapiŝo", "Rabeno Naĥman Potter kaj la magia herbtrinkaĵo" kaj "La Maharal Potter kaj la Golemo el Prago". Sed interesas min ankaŭ modernaj rakontoj, kiel ekzemple "La rabeno de Lubaviĉ kaj la mirakla dolaro", "Kaduri Potter kaj la mistika kameo" kaj "Maran Potter kaj la kaptito de Pekiin".



Memkompreneble, la afero havas ankaŭ pli seriozan flankon. La *Fidela Ankro* primokas, kiam ĝi konstatas, ke "plenkreskuloj freneziĝas pro la libroj pri Harry Potter", sed al mi ŝajnas, ke el tiuj frenezaj milionoj – prefere ili estu pli kaj pli multnombraj! – eĉ ne unu ĵetadas ŝtonojn sabate, nek sendas sabat-kontrolistojn en la vendejojn de la kibucoj, nek murdas sian ĉefministron, kaj malmultaj manĝas macojn dum pasko aŭ cirkumcidas siaj filojn. Eĉ, mi riskas la supozon, ke el la legantoj de tiuj ĉi fantaziaj libroj eĉ ne unu iros al krucmilito, micvo-batalo aŭ milito de sankta ĝihado, tiel reagante al tio, kion oni faris al Harry Potter.

La situacio estas malsimila rilate al tri aliaj rakontoj: "Nia praavo Abrahamo kaj la Promesita Lando", "Jesuo kaj la Sankta Tombo", "Mohameto kaj la Fluganta Ĉevalo". Tia etulo kiel mi ne estas kompetenta konstati, ke ĉi tie – Dio helpu! – temas pri imagitaj rakontoj. Iie, mi ne serĉas la malfeliĉon por mi mem, sed mi ne dubas, ke pro la tri supraj rakontoj freneziĝis multe pli da homoj, ol pro la rakontoj de Harry Potter, kaj ke tiu freneziĝo estas multe pli danĝera ol ia ajn literatura entuziasmiĝo.

*Artikolo publikigita originale en la hebrea lingvo en la israela ĵurnalo Yedioth Ahhronoth en la jaro 2009 kaj tradukita de Gabi Zeevi. La artikolo estis verkita de Meir Shalev, populara israela verkisto kaj ĵurnalisto, responde al religia kritiko pri la tiame furora serio Harry Potter, tamen la redakcio de Ateismo opinias, ke ĝi estas ankoraŭ aktuala pro sia trafa montrado, ke la bibliaj rakontoj ne estas malpli fabelaj kaj fantaziaj ol rakontaroj kiel Harry Potter.*



# Arestita niĝeria humanisto batalas por liberiĝo

*Briac Millon (Francio)*

Mubarak Bala, prezidanto de Humanisma Asocio de Niĝerio, estis arestita en la ŝtato Kaduno, la 28-an de aprilo, kaj translokita al najbara ŝtato Kano. En la antaŭaj semajnoj, li publikigis en Fejsbuko komentojn kritikantajn islamon, kiuj ŝokegis la profunde religian kaj konservativan parton de la lando. Sekve li estis akuzita pri blasfemo.

Kano havas duoblan ŝarian kaj ŝtatan juran sistemon; Bala estas akuzita laŭ la ŝtata leĝo pro malrespekto de la leĝo pri religia ofendo kaj pro retkrimo. Gravaj religiuloj en Kano premis, por ke Bala estu punata, vekante timon, ke oni procesos kontraŭ li laŭ la ŝaria juro.

De pluraj monatoj, ĝis ĉi tiu aŭtuno, liaj sano kaj kieo estis tute ne konataj kaj li ne povis kontakti siajn familianojn kaj advokaton. Lia edzino eĉ senespere pledis por ricevi "vivopruvon".

La 24-an de julio, fakuloj pri homaj rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj diris, ke estas "grava manko de konvenaj jur-proceduroj" en la traktado de Bala. Oficiala deklaro de fakuloj de UN asertis ke "la arestado kaj malliberigo de s-ro Bala simbolas persekutadon kontraŭ nekredantoj en Niĝerio". Tiu oficiala deklaro ankaŭ notis, ke "la malgranda komunumo de nereligiaj homoj aŭ nekredantoj en Niĝerio kutime suferas pro turmentado, persekutado kaj sociaj malpermesoj".

La forta kritiko esprimita de Bala pri religio kaj islamo en Niĝerio kaŭzis konsternon en la plejparte islama nordo, kie senkaŝa religia malkonsento estas malofta. Filo de vaste estimata islama klerulo, Bala ĉesis esti islamano en 2014. Lia familio devigis lin resti kontraŭvole en psikiatria kuracejo dum 18 tagoj ĝis oni finfine rajtigis lin eliri.

Por la unua fojo ekde sia aresto en aprilo, Mubarak Bala povis renkonti membron de sia advokataro, la 7-an de oktobro, raportis Humanists International (internacia asocio de humanistoj, kiu arigas humanistajn kaj ateistajn asociojn tra la mondo).

En komuniko, Humanists International taksas ke "dum tio estas bonvena kaj signifa paŝo antaŭen en la afero", ĝi informas ke ĝi "plu postulas ke la niĝeriaj instancoj garantiu fundamentajn homajn rajtojn al Bala; senliman eblecon kontakti siajn advokatojn; li estu aŭ akuzita de krimo aŭ liberigita; kaj se li estos akuzita, li estu translokita al neŭtrala teritorio por certigi lian rajton je justa proceso".

Humanists International, asocio kiu defendas la rajtojn de senreligiuloj tutmonde, opinias ke Mubarak Bala estas atakata pro sia neperforta insisto pri libereco de esprimo, religio kaj kredo. Unu el la advokatoj de Bala, James Ibor, diris: "Mia kolego renkontiĝis kun Mubarak lastatempe. Mubarak esprimis al li siajn timojn kaj rakontis ke samprizonuloj minacis mortigi lin se li ne paciĝos kun Dio. Li konstante timas pri sia propra vivo kaj tiuj de siaj edzino kaj infano."

En novembro 2020, advokatoj de Bala daŭre laboras por defendi lin. Ibor diris, ke li kaj la aliaj advokatoj de Bala estas "optimismaj".



*Mubarak Bala, prezidanto de Humanisma Asocio de Niĝerio*

*Artikolo preparita surbaze de informoj en la brita ĵurnalo The Guardian kaj en la retejo de Humanists International.*

# Poloj amasprotestas kontraŭ kortuma decido

*Nyegosh Dube (Pollando)*




Pollando jam havis la plej severan kontraŭabortigan leĝon en Eŭropo, kun esceptoj permesataj nur en tri kazoj: danĝero al la vivo aŭ sano de virino, gravediĝo pro seksperforto aŭ incesto, aŭ serioza difektiĝo de la feto. La 22-an de oktobro, la Konstitucia Tribunalo de Pollando deklaris la trian escepton kontraŭkonstitucia. La reago en la lando estis furioza, speciale inter virinoj: centmiloj da poloj elverŝiĝis en la stratojn, kaj tagon post tago, en urboj kaj urbetoj okazis grandaj protestoj. La protest-movado celis ne nur la kortum-juĝon, sed ĝenerale la registaron kaj la katolikan eklezion. "Ni ŝatus abortigi tiun ĉi registaron!" – jen unu el la multaj interesaj sloganoj videblaj dum la protestoj.

Abortigoj pro feto-difektiĝoj ampleksas 98% da leĝaj abortigoj en Pollando. Polaj virinoj, kiuj faras abortigojn pro kialoj aliaj ol la tri permesataj, iras al la najbaraj Germanio kaj Ĉeĥa Respubliko por tio – kiel montrata en la filmo "Kler" (Klerikaro), kiu aperis en 2018 kaj fariĝis furora en Pollando (vidu *Ateismo*, novembro 2018).

La leĝo, aprobita en 1993, estis la rezulto de forta premo fare de la pola katolika eklezio, sed tiutempe Pollando ja estis ankoraŭ fortikaĵo de

katolikismo, kun plejmulto, kiu regule ĉeestis preĝejajn mesojn. Tamen jam tiam, laikismo estis kreskanta forto, kaj ĝuste en tiu jaro, maldekstraj partioj venkis en nacia parlamenta elekto. Sed eĉ la maldekstraj partioj provis paciĝi kun la eklezio – en 1998, la pola prezidanto, el la ĉefa maldekstra grupo, subskribis konkordaton kun Vatikano, kiu oficiale donis al la katolika eklezio privilegian pozicion en la pola socio.

La protestoj okazis ne nur en la stratoj: la dimanĉon post la juĝ-anonco, grupoj da virinoj el la protest-movado eniris preĝejojn tutlande kaj interrompis mesojn, faris sid-strikojn antaŭ altaroj kaj tenis afiŝojn kun sloganoj. Interalie, ili skandis "Ni ne plu eltenas!" Tio estis io ŝoka en lando, kie ankoraŭ multaj iras al preĝejoj ĉiusemajne, kaj kie la eklezio estas daŭre potenca institucio. Sed eble tio estas taŭga maniero protesti kontraŭ kortum-juĝo farita sub la forta influo de la eklezio. Iuj en Pollando opinias, ke la juĝo plirapidigos la laikiĝon de la lando, kaj ke Pollando fariĝos kiel Irlando, kiu iam estis profunde katolika lando, sed nun sufiĉe forte sekulariĝinta. Fakte, laŭ opini-enketoj, pli ol 70% da poloj rigardas la decidon negative.

La juĝo de la Konstitucia Tribunalo estas rezulto de la transpreno de la juĝ-sistemo de Pollando fare de la reganta dekstra naciisma partio Juro kaj Justeco (pola mallongigo: PiS). El la 15 juĝistoj en la Konstitucia Tribunalo, 14 estis elektitaj de PiS. La Eŭropa Unio akre kritikadas la polan registaron pro tiu ĉi situacio. La partio ankaŭ plene transprenis publikan televidon (TVP), kiu nun elsendas propagandon ĉiutage. PiS estas proksime ligita al la katolika eklezio kaj provas antaŭenigi kaj enleĝigi ĝiajn prioritatojn.

Tio ne estas la unua fojo, kiam centmiloj protestas en Pollando pro abortig-rajtoj. En 2016, leĝ-propono por kompleta malpermeso de abortigoj kaj enkarcerigo de virinoj, kiuj faris abortigojn, puŝita de radikalaj katolikaj organizaĵoj, estis serioze konsiderata en la parlamento, kie la PiS-partio havis tiam absolutan plimulton. Pro la amasprotestoj, la leĝpropono fine estis retirita. (Vidu *Ateismo*, novembro 2016.)

La estro de PiS, Jaroslaw Kaczynski, la potenco malantaŭ la trono, nomas la manifestaciantojn "krimuloj", kiuj celas detrui Pollandon kaj alvokas al la subtenantoj de la registaro defendi la nacion, la eklezion kaj preĝejojn. Vendrede, la 30-an de oktobro, 100,000-150,000 da tiaj "krimuloj" ariĝis vespere por protesto en la centro de Varsovio, la plej granda manifestacio ĝis nun. Ili blokadis la ĉefajn vojkruciĝojn urbocentre. Miloj ankaŭ manifestaciis en aliaj polaj urboj. Kelkmil en Varsovio amasiĝis proksime al la domo de Kaczynski, granda nombro da polic-veturiloj kaj policanoj estis senditaj tien por protekti lin. Intertempe dekstraj ekstremistoj, certe aŭskultinte lian alvokon, atakis la urbocentrajn manifestaciantojn. Oni vidis afiŝojn ĉe la protestoj kun la slogano "Tio ĉi estas milito!" Jes ja, ĝi estas milito – deklarita de la registaro kontraŭ la plimulto de poloj, kontraŭ sekularaj, demokratiaj principoj.

# Ĉu senfinaj atakoj kontraŭ gazetara libereco kaj la rajto blasfemi?

*Briac Millon (Francio)*




Ree Francujo estas celata de islamistaj teroristoj ekde la komenco, la 2-an de septembro 2020, de la proceso pri la atencoj kontraŭ la satira gazeto *Charlie Hebdo* okazintaj en januaro 2015.

**La 25-an de septembro**, en Parizo, du homoj estis vunditaj pro tranĉil-atako. La atako okazis matenfine ĉirkaŭ la ekslaborejo de *Charlie Hebdo* – tiu sama gazeto, kiu estis atakita de teroristoj en januaro 2015, mortiga atako, proceso pri kio ĝuste tiam estis okazanta.

La atako okazis kiam tiuj du cigaredumis ekstere, en la strato antaŭ sia laborejo.

La "ĉefa aŭtoro" de la atako estis arestita, laŭ la Nacia Kontraŭterorisma Magistrataro (france PNAT, Parquet National Antiterroriste). Li estas 25-jara pakistanano. Ankaŭ alia suspekto, 33-jara alĝeriano, estis arestita. Sed li tute ne kulpis, kaj fakte postkuris la teroriston provante haltigi lin, do estis liberigita.

Tiu atako okazis ekster la ekslaborejo de *Charlie Hebdo*. La teroristo ja deziris ataki tiun gazeton kaj pensis, ke li atakas ĝian nunan laborejon. La du viktimoj laboras kiel ĵurnalistoj ĉe tiu laborejo, tamen ne por *CH*, sed por

la agentejo Première ligne.

Reage al la atako, *Charlie Hebdo* publikigis retan front-artikolon. Jen parto de ĝi: "tiu tragedia evento pruvas denove, ke fanatikismo kaj netoleremo, kies fontojn la enketo videbligos, ankoraŭ vaste ekzistas en la franca socio. Ne timigante nin, male, tiaj eventoj devus igi nin eĉ pli batalemaj en la defendado de niaj valoroj. Ni tute ne cedos ion ajn al mortiga kaj krimeca logiko de tiuj ideologioj, kiuj instigas al tiuj agoj, kaj kies elpensintoj estas simple faŝistoj."

**La 16-an de oktobro** franca instruisto estis senkapigita pro montrado de blasfemaj karikaturoj pri Mahometo el *Charlie Hebdo*. Tiu mezlerneja instruisto pri historio, geografio kaj "morala kaj civitaneca instruado", S-ro Samuel Paty, montris tiujn karikaturojn dum klaso pri libereco de sinesprimado.

Grava miskompreno kaj infera sinsekvo da eventoj okazis post tiu kurso, kaj kelkaj gepatroj akuzis tiun profesoron, ke li petis al la islamanaj lernantoj foriri momente de la kurso por ne esti ŝokitaj (poste oni lernis, ke li ne faris tion); patro de islamana lernanto faris videon por esprimi sian nekomprenon kaj koleron pri tiu peto; tiu video iĝis popularegaj en sociaj retejoj; kaj la teroristo trovis klaran celon.

Post tiu terura atako, la prezidento de Francujo Emmanuel Macron parolis la **21-an de oktobro** omaĝe al S-ro Paty. Dum sia parolo li diris interalie, ke "Ni ne rezignos [la rajton fari] karikaturojn". Tiu frazo precipe kaŭzis multajn manifestaciojn en la islama mondo, kaj kreiĝis internacia bojkota kampanjo kontraŭ Francujo: ĝia prezidento defendas la rajton blasfemi!

Tio ne estas akceptebla por multaj regantoj en la islama mondo, kaj la plej vigla ŝtatestro kontraŭ Macron certe estas Recep Erdoğan, la prezidento de Turkujo: "ĉio, kion oni povas diri pri ŝtatestro, kiu traktas milionojn da membroj de religiaj komumunumoj en tia maniero estas: unue trapasu mensajn ekzamenojn". Erdogan estis krome kolerigita pro karikaturo de li fare de *Charlie Hebdo*. La eks-ĉefministro de Malajzio, Mahathir Mohamad, eĉ pepis, ke "islamanoj rajtas koleriĝi kaj mortigi milionojn da francoj pro la masakroj de la pasinteco".

Tia netolerema etoso bedaŭrinde tiel kreis malamon, kaj malamo kreis perforton.

**La 29-an de oktobro**, tuniziana islamisto mortigis tri homojn en katolika preĝejo de la franca urbo Nico, inkluzive de unu brazilanino. Li alvenis en Francujon komence de oktobro, per la migrada vojo de Lampedusa (itala insuleto proksime de Tunizio).

La urbestro de Nico denuncis "islam-faŝismon" kaj alvokis al unueco de la loĝantoj de Nico. Ne estas la unua fojo, ke Nico estas trafita de islamista terorismo: oni memoru la atencon de la 14-a de julio 2016, kiam teroristo prem-mortigis 86 homojn per sia kamiono okaze de la franca nacia festo.

La saman tagon pluraj aliaj atakoj okazis en Francujo, feliĉe malpli seriozaj, kun neniuj mortigoj: en la urbo Liono afgano minacis homojn per tranĉilo, en

Avinjono homo kun pafilo kaj vesto de la ekstrem-dekstra grupo Génération Identitaire (“Identeca Generacio”) minacis arab-devenan komerciston. Tiu pafilulo estis pafita de policanoj. Plie, alilande, en Ĝeda, Sauda Arabujo, gardisto de la franca konsulejo estis ponardita.

Multaj ŝtatestroj tra la mondo, inkluzive en la islama mondo, kondamnis la atencon en Nico. La turka ministerio pri fremdaj aferoj esprimis sian “solidarecon kun la franca popolo kontraŭ terorismo”. Ĉu tiuj saĝaj vortoj bedaŭrinde ne venis iom tro malfrue? La 28-an de oktobro, unu tagon antaŭ la atenco en nica katolika preĝejo, Erdogan akuzis eŭropajn landojn, kiuj defendas la rajton blasfemi, deziri “rekomencigi krucmilitojn”.

Verdire, la celo de la ŝtatestroj de la islama mondo ja ne estas protekti francajn islamanojn, kiuj estus minacataj en Francujo, interalie pro la rajto blasfemi. Ili havas pli cinikan celon, deviigi protestojn en siaj landoj eksterlanden, por ne esti la celo de protestoj enlande. Kaj tiel plifortigi la oligarkion en Pakistano, aŭ la diktaturon en Turkujo, ktp.

Kiel ni povas scii tion? Nu, tre simple. Krimoj kontraŭ la homaro estas farataj en la ĉina regiono Ŝjinĝjiango kontraŭ la ujgura minoritato. Nur ĉar tiu tjurka minoritato estas islamana. En Ŝjinĝjiango ujguraj islamaninoj estas amase steriligitaj. En Ŝjinĝjiango sufiĉas esti islamano por esti sendata en koncentrejon (lokoj de deviga laboro, cerbolavado, torturo...). En Ŝjinĝjiango sufiĉas ne manĝi porkaĵon, surhavi barbon, celebri islaman feston por esti sendata tien. En Ŝjinĝjiango ĉinaj instancoj detruas moskeojn.

Estas tute normale, ke vi ne aŭdis regantojn en la islama mondo instigi homojn bojkoti Ĉinujon por subteni ujgurojn: ili ne faris tion. Landoj kiel Pakistano, Jemeno, Palestino, Sudano, Irako, Sirio, Egiptujo kaj aliaj eĉ subtenas Ĉinujon pri ĝia politiko en Ŝjinĝjiango ĉe UN. Pro simpla kialo: mono.

**Komence de novembro** la teroristaj grupoj Al-Kajda kaj Islama Ŝtato alvokis mortigi iujn ajn, kiuj insultas la profeton Mahometo.

Unufraze, mallumaj tempoj por gazetlibereco, la rajto blasfemi kaj tutsimple libereco!

Tamen nun estas konfirmite, kio plej timigas teroristojn kaj fundamentistojn: edukado, esprimlibereco, kredlibereco. Ni do defendu tiujn.

“La vero ne ŝanĝiĝas, nur ĉar ĝin kredas, aŭ ne kredas, la plejmulto da homoj.”



*Giordano Bruno (1548-1600), filozofo, bruligita kiel herezulo*

# LETEROJ AL LA REDAKCIO

## Klarigo rilate al artikolo pri islama faŝismo

*Luís Ladeira (Portugalio)*

En artikolo verkita de mi, aperinta en la antaŭa numero de tiu ĉi bulteno (n-ro 30, Majo 2020), kun la titolo "Eksislamanino pri la minaco de islama faŝismo", je la paĝoj 24 kaj 25, aperas kelkaj ŝanĝoj kompare kun la originalo. Pri iuj mi dankas, pri aliaj mi bedaŭras, ĉar ĉi-lastaj sensencigis la artikolon. La artikolo celas recenzi la verkon *Detrui la Islaman Faŝismon* de Zineb el Rhazoui, eksĵurnalisto de la franca gazeto *Charlie Hebdo*.

Krom la titolo – kiu asertas pli ol la propra verko permesas kaj memkontraŭas eron de la propra revizio kaj pri kiu mi ne respondecas – aperas, en la teksto, ankaŭ sen mia konsento, interŝanĝoj de la vortoj "muzulmano" kaj "islamano". Tio okazis kvinfoje, t.e. kvinfoje la redakcio ŝanĝis la originalan vorton "muzulmano" al la supozebla sinonima vorto "islamano". Grava eraro!

Okazas, ke por la aŭtorino, la centra tezo – "islamismo estas faŝismo" – kuŝas interalie sur neidenteco inter la konceptoj "islamano" kaj "muzulmano". La vortoj, do, ne sinonimas. Laŭ la penso de Zineb el Rhazoui, iu muzulmano povas esti islamano aŭ ne. Nur tiel kompreniĝas, kial ŝi dediĉas la verkon al "muzulmanoj-ateistoj".

Do, por igi la tekston senca, bonvolu relegi ĝin kun jenaj ŝanĝoj je la taŭgaj lokoj. Jen:

- Je la titolo: "**Muzulmanino** pri la minaco de islama faŝismo" anstataŭ "Eksislamanino pri la minaco de islama faŝismo".
- Je la unua alineo: "Dediĉita "al **muzulmanoj**-ateistoj"…" anstataŭ "al islamanoj-ateistoj".
- Je la tria alineo: "Pri tio, Zineb, kiu prezentas sin kiel **muzulmanino**…" anstataŭ "… kiel islamanino". Kaj "…al proleta rezisto ("**muzulmano** la nova proleto!") anstataŭ "("islamano la nova proleto!")".
- Je la kvara alineo: "… en la vortaro Larousse "kontraŭemo al islamo, al **muzulmanoj**" – en kiu identiĝas islamo kaj **muzulmanoj** – " anstataŭ "kontraŭemo al islamo, al islamanoj" – en kiu identiĝas islamo kaj islamanoj –".

### Respondo de la redakcio de Ateismo:

Ni dankas al Luís Ladeira pro lia letero kaj atentigoj. Ni bedaŭras pro la miskompreno, sed ni ŝatus rimarkigi du aferojn: 1) En Esperanto, ne ekzistas diferenco inter "muzulmano" kaj "islamano"; laŭ PIV "muzulmano" estas evitinda vorto kun la signifo "islamano"; 2) En la artikolo ne estas klarigite, ke El Rhazoui uzas la vorton "muzulmano" kun aparta signifo.

# ATEISMO

## ENHAVO

**Vorto de la Redaktoro**

**Ateisma Vivo**

Someraj kunvenoj de ATEO 3

Kial mi fariĝis ateisto (8 kontribuoj de membroj) 5

ATEO havas novan prezidanton! 13

**Pripensigoj**

Pri la universo, dio kaj religioj 14

La sankta Harry Potter 17

**Ĉirkaŭ la Mondo**

Arestita niĝeria humanisto batalas por liberiĝo 20

Amasprotestoj en Pollando kontraŭ kortuma decido 22

Ĉu senfinaj atakoj kontraŭ gazetara libereco? 24

**Leteroj al la Redakcio**

Klarigo rilate al artikolo pri islama faŝismo 27

Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
ateismo.bulteno@gmail.com
Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:
anna.lowenstein@esperanto.org

Prezidanto: Giridhar Rao, Barato
Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio
Sekretario: Anna Lowenstein, Britio
Kasisto: Dieter Rooke, Svislando
Grafikisto: Lautaro Croce, Argentino
Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando

Jarkotizo: 10 eŭroj (A-landoj) / 8 eŭroj (B-landoj)
Konto: ateo-y ĉe UEA